

Amuzu, lernu, ridu!

① KREU NOV AJN VORTOJN

aldonante (a) unu literon en la internon aŭ

forprenante (f) unu literon el la interno aŭ

ŝanĝante (ŝ) unu literon en la interno de la donita vorto.

(Ekzemploj: *koro (a) > kor**bo**, saŭno (f) > sano, nomo (ŝ) > noto*)

Skribu la aldonitajn, forprenitajn aŭ ŝanĝitajn literojn laŭvice en la subajn kvadratetojn.

1 koto (ŝ)

2 kampo (f)

3 truo (f)

4 pia (a)

5 maŝo (ŝ)

6 kuzo (ŝ)

7 litero (ŝ)

8 kuzo (a)

9 baleto (ŝ)

10 stano (a)

11 kurzo (f)

12 letero (ŝ)

13 rano (ŝ)

14 kelo (ŝ)

1	2	3	4	5	,	6	7	8	9	10	,	11	12	13	14	!
---	---	---	---	---	---	---	---	---	---	----	---	----	----	----	----	---


② **I O M D A M A T E M E T I K O**

KIUN CIFERON VI ENSKRIBOS ANSTATAŬ DEMANDSIGNO?

			16			
			4			
		77		87		
	45		32		55	
26		19		13		?

③

Ligu la formojn supre kun la samformaj objektoj sube en la bildo:



Kiujn formojn vi uzos por desegni:

libron
kristnask-arbon
ringon
Saturnon
rimenon
la sunon
vel-boaton
ŝtonon
diamanton
domon
raketon
pilkon
pordon
rugbean pilkon
fenestron

ICLM:
3876
Belmont
Ave,
San Diego
CA 92116
Usono

JA n-ro 78-79, 96/3-4, p. 3

④

PROVERBOJ

Por en-amig'into Bagdad ne estas mal-proksima

(turka)

Por kio oni huf-ferus² hundon?

(korea)

En put³ la rano⁴ ne scias pri la oceano⁵

(ĉina)

Lum'ingo⁶ sian bazon⁷ ne pri-lumas

(araba)

Korva⁸ mal-beno⁹ ĉevalon ne mort'igas

(brazila)

Grand'egaj estas la kornoj¹⁰ de la trans-maraj bovoj¹¹

(el Tahitio)

JA n-ro 2-3
1982, p. 20

1. popola dir'ajo / 2. al-igi fer-pecon al piedo de la besto / 3. profunda truo / 4. verd-kolora besto viv'anta en star-akvoj / 5. maro / 6. ujo por lum'ilo / 7. mal-supra parto de objekto / 8. birdo / 9. voli mal-feliĉon por iu / 10. el-star'ajo sur la kapo de la besto / 11. granda-hejm-besto, kies ino donas lakton.

⑤ Krokodiloj - la imponaj reptilioj

Ĉu vi konas persone krokodilon? Mi ne aludas al esperantista krokodilanto! Mi parolas pri la vera besto.



La krokodiloj estas inter la plej grandaj reptilioj en la mondo. La nila krokodilo kaj la mara krokodilo estas proksimume 7 metrojn longaj. "Krokodiluloj" estas la orda nomo por krokodiloj, kajmanoj, aligatoroj kaj gavialoj.

Estas pluraj diferencoj inter ili. Sed ni parolu pri la plej simpla: la dentoj. Ĉe la krokodiloj oni vidas la suprajn kaj kelkajn subajn dentojn, dum la buŝo estas fermita. Ĉe la kajmanoj kaj aligatoroj oni vidas nur la suprajn, kaj ĉe la gavialoj la buŝo estas multe pli longa kaj mallarĝa.

Krokodiloj estas en danĝero ĉar, eĉ se oni ne plu rajtas ĉasi ilin, malleĝaj ĉasistoj tamen faras tion por vendi iliajn haŭtojn kaj dentojn.

Vivlokoj kaj vivmaniero

Ĉiuj, specioj – krom la mara krokodilo – vivas en malsalaj akvoj. La vivodaŭro de krokodilo ĉirkaŭas 80 jarojn.

Tiuj grandaj reptilioj estas tre bonaj naĝantoj, kiuj vivas en akvo kaj proksime de ĝi. Ili havas rempiedojn, skvamojn kaj - kiel dirite - longan buŝon kun akraj dentoj. Vivantaj en trankvilaj akvoj, ili atendas bestojn por kapti. Krokodiloj estas tre lertaj en la akvo, sed malpli surtere, eĉ se ili povas kuri tre rapide. En la akvo ili ĉefe uzas sian fortan voston por antaŭeniri.

Nutrado

Ili nutras sin per fiŝoj, etaj akvo-bestoj aŭ grandaj bestoj, kiuj venas al la river-bordo. Kiam krokodiloj naĝas, videblas de ili nur la okulojn kaj la nazon. Tio helpegas por kapti surborde la grandajn bestojn. Per sia granda kaj forta buŝo la krokodilo tiras ilin en la profundan akvon por ilin dronigi. Kontraŭe al tio, kion oni diras, krokodilo manĝas nur po 5-6 kilogramojn da viando semajne!

La
plej

MAGIAJ¹ VORTOJ

En ĉiu lingvo, ekzistas vortoj, kiuj havas la saman formon, se oni legas ilin de dekstre, kiel ordinare, aŭ de maldekstre. Ankaŭ la Internacia Lingvo havas tiajn vortojn. Jen estas kelkaj el ili:

ORO, NUN, UNU, IRI, SES

Ekzistas eĉ pli longaj, kiel:

SAVAS, NOMON, SIDIS, SONOS k. t p.

Alia grupo de magiaj vortoj estas tiuj, kiuj havas novan senco, kiam oni legas ilin en inversa² direkto. Legu, ekzemple, la sekvajn vortojn en ambaŭ direktoj:

EN, ARKA, AMAS, ONI

grandaj specioj povas esti danĝeraj por la homoj. Krokodiloj mortigas centojn da homoj jare...

JA, n-ro 2/2014 Samuel, Svislando

⑥

La TASKO: Serĉu similajn du-vizaĝajn vortojn.

⑦ Ridu!

Renkontiĝis du amikoj, unu havis grandan ŝvelaĵon sur la frunto.

„Kio okazis al vi?“

„Muŝo.“

„Ĉu pikis?“

„Ne, sidiĝis. Frato murdis ĝin per ŝovelilo.“

Renkontiĝis du amikoj, unu havis nur unu ŝuon.

„Ĉu vi perdis unu ŝuon?“

„Ne, mi trovis ĝin.“

En mezepoko renkontiĝis du amikoj en Prago sur Malnovurba placo. Unu havis en mano bukedon.

„Kien vi iras kun la bukedo?“

„Mi iras gratuli al Karlo.“

„Sed hodiaŭ ne estas nomtago de Karlo.“

„Tio ne gravas. Sed estas la kvaran.“

Renkontiĝis du amikinoj.

„De kie vi iras?“

„Mi partoprenis teston pri gravedeco.“

„Ĉu estis malfacilaj la demandoj?“

Ĉu vi konas rimedon kontraŭ
amo je la unua rigardo?

La dua rigardo
